

Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista.
N° 42 (60) - Majo/Junio 1982 - Prezo : 3 FF ISSN 0150-5823



Unujara abono : 18 FF (Francio : 15 FF)
al la poŝtkonto n° 3 371 74 M BORDEAUX de la eldonanto :
Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT

LA UNUAMAJA
FLAMIĜEMA BRULEGO

Sur la unua jaro de naskiĝo
de matenantaŭkrepusko de Esperanto
ekflamiĝis
la laboristaraĵ demonstradoj
en Ĉikago
tramalsekigitaj per ilia sango
plibonigitaj per kvin mortaj verdiktoj
de senkulpaĵ laboristoj
La unua kongreso de Dua Internacio
publikigis ilin
kiel
la Tagon de monda laboristara solidareco
Plenumiĝis la voto de historio
ke sole
la laboristara klaso de mondo
realiĝos
pli belan pli bonan sociordon sur la tero
Kaj kiam la laboristara klaso
ekregos la kosmon
la Unua de Majo
estos
la festo de Ekumeno
la signo de trapasita vojo de homo
de sklavo ĝis ĈIOHOMO ...

D-ro Dragan Dimitrijeviĉ Russchitty

Cercle espérantiste
de l'Agenais, F 47340
LAROQUE TIMBAUT
Poŝtkonto 3 371 74 M Bordx

LIBRO-SERVO DE A.E.R.A.

maljuneco kaj esperanto

Prezoj en francaj frankoj majo 1982
sen afranko. Pagi post ricevo de l'fakturo.

| | | | |
|----------------------------|-----|---------------------------|------|
| Absolutismo (Lanti) | 3. | Kiel esti amata (Brandys) | 7. |
| Nouveau cours rationnel | 35. | Liberigo de timo kaj | |
| ,, (bindita) | 40. | mizero (Bellamy-asocio) | 2. |
| Kasedo por tiu kurso | 30. | Libero kaj Amo (Petöfi) | 20. |
| Dictionnaire pratique | 50. | La varmega suno (albumo | |
| Dictionnaire de poche | 12. | por infanoj) | 5. |
| Esperanta mozaiko | | Ne tiel, sed tiel-ĉi | |
| (Faulhaber) | 12. | (Faulhaber) | 12. |
| "Esperanto, volontiers!" | | Plena vortaro de Esp-o | 50. |
| (9 glumarkoj Ø 32 mm) | 1,5 | Plena ilustrita vortaro | 240. |
| Falsaj amikoj en Esperanto | | Sennacieca Revuo, 1978 | 10. |
| (Bernard kaj Ribot) | 3,5 | Skizo pri filozofio de | |
| Porto de l'Vero (Adi) | 10. | la homa digno (Gille) | 7. |
| Froŝa mateno (R.Kritz) | 25. | Tra dezerto kaj praarbaro | |
| Granda Dictionnaire | | (Sienkiewicz) | 40. |
| Esp/Fr. (Waringhien) | 60. | Tri Verkoj de Volter | |
| Gvidlibro de ekzamenoj | | (trad. Lanti) | 35. |
| de F.E.I. | 2,5 | Vivo de Lanti (Borsboom) | 52. |
| Hamburgo en retrospektivo | | Vivo de Zamenhof (Privat) | 35. |
| (Lapenna) | 40. | Vocabulaire espéranto | |
| Historio de SAT (1921/52) | 10. | (Duc-Goninaz) | 15. |
| Junulejo (Cané) + La buĉ- | | Vojaĝo al Kazohinio | 35. |
| ejo (Echeverria) | 10. | Vers une communication | |
| Junulkurso (por francoj) | | transnationale 10 ekz. | 5. |
| kun suplemento | 24. | L'espéranto au service | |
| Diskoserio por tiu kurso | 30. | des jeunes (100 folioj) | 8. |
| Kalejdoskopaj varieteo | | Une langue internationale | |
| (Ergoto de Bonaero) | 10. | pour écologistes et | |
| Kiel diri...? (Lentaigne) | 15. | non-violents (100 folioj) | 16. |

U nue ŝajnas al mi, ke la problemo de loĝejo ne estas la ĉefa kialo de la izolo de maljunuloj kiel asertas Jacqueline. La ĉefa kialo estas egoismo de pli junaj generacioj. En malriĉaj landoj, ĝenerale (eĉ kvazaŭ ĉiam) geavoj vivas kun gefiloj kaj genepoj, kvankam la loĝkondiĉoj estas malpli bonaj ol en nia lando. Ĝojige estas, ke ili ne estas izolitaj kaj ke poste, kiam la gefiloj maljuniĝos, la nunaj genepoj ilin flegos. Kompreneble, la homoj ne estas diferencaj disde ni, sed ili ne havas alian eblecon, ĉar la ŝtato ne protektas maljunulojn kiel en niaj landoj. Al multaj la ŝtato tiel ebligas ne zorgi pri maljunuloj kaj havi pli da libero, kiun ili aliflanke repagos per izolo dum sia maljuneco.

Esperanto povas alporti multe al maljunuloj, samkiel cetere al junuloj kaj mezaĝuloj. Se ne paroli pri la idealo, kiun oni povas trovi utopia, la praktikaj avantaĝoj de esperanto estas multaj, korespondado estas agrabla kaj instrua tempopasigilo, kiu certigas novajn amikojn, vojaĝoj (sed por maljunuloj ili malfacile eblas) estas ege plifacilitaj per ĝi. Ne pro tio, ke esperanto estas amase parolata, sed pro tio, ke almenaŭ la lingvo estas unueco-faktoro. Pere de esperanto mi sukcesis en malpli longa tempo havigi al mi pli da amikoj ol per la germana aŭ la angla, kiuj estas amase parolataj, verdire malpli disvastigataj lingvoj kreas senton de komuneco, pro tio mi kredas ke esperanto devas disvastiĝi, sed ke se ĝi atingos tutmondan disvastiĝon, ĝi ne plu estus kiel nun, do malpli interesus min.

Maljunuloj eble eĉ pli aprezus la eblecon havi amikojn, eĉ leterajn, amikan etoson, kiu elirigus ilin el la izolo. Tamen estas kelkaj problemoj. En maljuneco la memorkapablo regresas kaj estas certe malfacile al multaj lerni kontentige (se ne paroli pri perfekte) la lingvon kaj esperanto ne bezonas nur komencantojn. Mi supozas, ke la lernado de esperanto ne estas tro facila por maljunuloj, escepte por tiuj, kiuj ĝin

Por jenaj libroj riceveblaj el Japanio, mendu al ni !

La prezoj entenas la afrankon.

| | | | |
|--------------------------------------|-----|---------------------------|------|
| Malvasta kaĝo (Eroŝenko) | 27. | Sarkasme k entuziasme | 41. |
| La tundro ĝemas (,,) | 22. | Skiza historio de la utao | 27,5 |
| Lumo kaj ombro (,,) | 22. | (ambaŭ de Miyamoto masao) | |
| Studoj pri la E-literaturo (Benczik) | 45. | | |

lernis antaŭe, ĉar kvankam nia lingvo estas facila, oni bezonas iom da tempo kaj da streĉiĝo por majstri la lingvon. Mi eĉ konas almenaŭ unu maljunan esperantiston, kiu post 35-jara lernado apenaŭ balbutas esperanton. Aliflanke rilatoj inter maljunuloj kaj aliĝuloj ne ĉiam estas tre facilaj. Mi mem havas relative maljunan korespondanton, kiu estas okulmalsana (parte pro la aĝo) kaj timas blindiĝi. Vi povas bone imagi, ke liaj problemoj malhelpas niajn rilatojn pro tio, ke li ne klopodas forgesi sian sanstaton. Se mi ne konscius, ke mi estas estonta maljunulo, mi (kaj tion tutcerte faras aliaj) tutcerte serĉus pli facilan korespondadon. Ni krome devas diri, ke nia movado, en okcidenta Eŭropo, multe maljuniĝis (vidu LKK n°20, p.20) kaj, ke ni nepre devas varbi almenaŭ mezaĝajn elementojn, se la okcidenta esperantismo ne deziras malaperi. Pro tio necesas varbi, ĉar nia lingvo havas argumentojn, sed kiel diskonigi ilin al la ekstera mondo? Ni ne havas sufiĉajn financajn rimedojn. Estas tamen kelkaj eblecoj: varbi en marginaj medioj (tion faras SAT kaj SAT-Amikaro kun ioma sukceso), la danĝero estas, ke precipe tiuj marginaj medioj forpelushomojn el aliaj medioj.

Esperi pri enkonduko de esperanto en la lernejojn, kio certe instigos multajn ĝin lerni por havi sen tro da peno bonajn notojn (vidu la ekzemplon de la okcitana en la lernejoj), tutcerte estas terure egoisma kialo, sed postrestos kelkaj veraj esperantistoj, ĉu ne Jacqueline? (kiu travivis la saman sperton en universitato de Clermont-Ferrand). La varbado ĉe maljunuloj devus esti konsiderinde pli facila pro tio, ke ĉiuj almenaŭ konas esperanton, kies sukceso en la 30aj jaroj estis grandega en okcidenta Eŭropo, kaj eble ne tre stabila pro tio, ke parto de ĝi estis nura modo. Tamen kiel helpis tiu modo! Alia problemo nun estas, ke ni ne estas ĉiam sufiĉe multenombraj por fari la propagandan laboron, parte pro tio, ke precipe maljunaj esperantistoj foje emas al "emeritiĝo", t.e. deziras, ke malpli aĝaj esperantistoj transprenu la laboron, eĉ kiam ne estas eblecoj. Sed pri varbadaj problemoj ni ne parolu ĉi tie, alie ne estus alia temo en la tuta venonta jarkolekto de Laŭte.

Robert.

Ĵansebo siavice kontribuas :

1. Maljuneco ĝenerale -

Homoj de ĉiuj aĝoj povas harmonie kunvivi, se ili respektas la vivstilojn de la aliaj. Laŭ mi, la homoj ne devas esti disigataj laŭ la aĝo, sed laŭ la emoj:

- la unuaj ŝatas stabilecon: familioj kun junaj infanoj, gemaljunuloj, kiuj ne eltenas la rapidecon de la moderna vivo. Se ili loĝas en la samaj kvartaloj, ili povas interŝanĝi servojn: infanvartadon, riparadojn, aĉetadojn.
- la aliaj ŝatas ŝanĝon: precipe fraŭloj, eksedziĝintoj (malfacile prononcebla vorto!), gemaljunuloj, kiuj ne timas ŝanĝi siajn kutimojn (multaj estas tiaj inter la esperantistoj). Tio ebligas pli rektajn rilatojn: neantaŭviditajn invitadojn, pli noktan vivon. Tiu vivstilo konvenas al multaj.

2. Maljuneco en Esperanto -

Mi ŝatas la mikسادon de la diversaj aĝoj en Esperanto - kiun mi renkontis en neniu alia medio.

Gemaljunuloj havas tempon kaj sperton. Kial ne uzi ĝin por faciligi la uzadon de la E-movado al la novuloj? Mi konfesas, ke mi ofte rezignis peti informon aŭ aliĝi al asocio pro troa malsimpleco de la klopodoj - aŭ manko de tempo. Estas multe da laboro por fari tiuflanke.

Ĵansebo.

*
*
*

Daŭrigas Nicole Déjean:

Maljuniĝo estas natura procezo de ĉiu ajn vivaĵo, sed pli-malpli malakceptita en nia moderna okcidenta socio. Ĉio rapide evoluas, ŝanĝiĝas kaj devas esti efika, laŭmoda; maljuniĝo povas aspekti kiel bremsado, malhelpo, eĉ defalo. Plue eblas longe diskuti pri kio estas maljuneco: biologie tio estas relative facile difinebla, sed mense, psike?

Falis la tradiciaj moralaj valoroj, sed, dank'al materiaj riĉaĵoj, potencaj postenoj, en familio aŭ en politika aŭ ekonomia situacio ofte regas maljunuloj. Povas esti malkompatible konkuro inter generacioj. Sed ne estas egaleco ankaŭ

inter maljunuloj : la malfortuloj, malriĉuloj estas taksitaj kiel "helpataj personoj", traktataj kiel infanoj, ne eblas al ili digne vivi. Malespero, mizero povas trafi ankaŭ junulojn, kruela kaj akra povas esti la soleco de junuloj same kiel de maljunuloj. Sed malbonaĵoj pro maljuniĝo aldonas specifikajn malfacilaĵojn eĉ suferojn. Ĉiu individuo havas proprajn ritmon, emojn, bezonojn, kiuj evoluas ne nur pro la aĝo, kaj neniu ŝatas vivi en getto. Divido de la socio en kategorioj, kiuj pli kaj pli malfacile renkontiĝas, kunvivas, estas kontraŭnatura kaj malekvilibriga...

Sed ni ne subite iĝas maljunaj. Niaj vivkapabloj, niaj interesoj al nia medio, al nia mondo, nia atento por la aliaj - junaj aŭ ne -, certe faciligas adapton al maljuneco. Maljuneco estas propra kaj socia fenomeno. Responsi pri estonteco estas provi sin konservi korpe kaj mense sana, aktiva, iĝi pli kaj pli scivolema, malavara.

Tiucele esperanto povas esti bona rimedo : Esperanto estas ilo por komunikado inter personoj, kiuj ne parolas la saman lingvon, esperanto estas ilo por kunigi la homojn, kies idealo estas forpeli maltolerecon, perfortajn rilatojn, do Esperanto devus ankaŭ favori rilatojn inter generacioj, almenaŭ ebligi reciprokajn helpadojn, atentojn, komprenemon.

Se ne estas solidareco, kunlaborado, inter diversaj esperantistoj, ĉu esperantistoj trafos sian celon ? Ĉiuj fortoj, ĉiuj spertoj, ĉiuj bonvolemoj estas necesaj por disvastigi la transnacion lingvon. Sed esperanto ne estas sorĉovergo kaj nenion povas, se ne estas en la homoj, kiuj interesiĝas al tiu lingvo, forta deziro, inklino al ĝia idealo.

Nicole Déjean.

Jacques Paul :

- Mi ne emas partopreni tian debaton. De kelkaj jaroj, oni provas apartigi homojn, kredigante, ke ĉiu kategorio havas proprajn problemojn, solveblajn aparte. En Esperantio mi renkontis nek maljunulojn, nek virinojn, nek samseksemulojn... mi renkontis homojn, kiuj klopodis

vivis kune, respekti unu la alian, kaj fakte plejofte sukcesis tion fari.

Patriko : Maljuneco kaj esperanto

Ĉiu ulo sub la luno naskiĝas, kreskas, klimaksas, malkreskas, mortas kaj...renaskiĝas... Ne temas pri religia konsidero sed pri nura rigardo al naturo. Do ni ne konsideru junon kaj oldon (la vorto maljuno ne taŭgu...) kontraŭaj estoj, la rilatoj inter ili ne limigeblas al nura kontraŭeco.

Ankaŭ en socio ne devus ekzisti apartigado de priaĝaj klasoj kaj diskriminacio inter ili. Apartigado estas intereso de ŝtatoj, kiuj dispartigas kaj dividas por plej facile regi...

Mi ĝojis konstati, ke ĉiuj partoprenantoj de tiu ĉenletero bone sentis kaj esprimis la maljuston pri apartigado de la aĝoj. Ili pravis atesti pri la fakto, ke en la E-medio tiu apartigo preskaŭ ne ekzistas, kompreneble ĉar ĉiuj junaj kaj nejunaj same interesiĝas pri Esperanto kaj multaj gemaljunuloj sciis resti mense junulaj (eĉ infanaj) dum la junuloj jam kadukiĝis kaj glitas al senilo...

Pro ĉio tio kaj pro tio ke kiam estas komuna emo kaj amo, tiam aĝo ne plu baro estas sed detalo, mi proponas al la laŭtelegantaj SAT-anoj agi favore al nuligo de tiu priaĝa kaj priaĝa mortanta instanco elpensita de maljunaj cerboj laŭ modelo de bojskotaj kaj militemaj organizaĵoj de faŝistaj pedofiloj kaj infanturmentistoj : la junulfako de SAT.

Patriko.

Profesoro IBUKA, fondinto de SONY-firmao (Japanio) asertas, ke, kiam la diversaj generacioj vivas kune kaj kiam la geavoj regule vizitas la genepojn, rezultas grandaj avantaĝoj por la kulturo, la inteligento kaj la prudento. La geava emo rakonti anekdotojn estas neanstataŭigebla fonto por stimuli la imagkaj kre-kapablon de la gejunuloj. (laŭ raporto de Jean-Jacques Servan-Schreiber, p. 321-322 de lia libro "La tutmonda defio" eldonita en multaj lingvoj).
Kribo.

Post "Maljuneco kaj Esperanto" divenu la temon ! - ????...
Nu : "Mommortigo kaj Eŭtanazio" ! Nefrancaj legantoj de "Laŭte!", vi estas nepre dezirindaj en niaj debatoj per ĉenletero. Internaciigu la bultenon ! Tiucele skribu al la red.



VORTOJ DE MALJUNULO

— — —
valo
— — —

Denove pri kulturo

La legintoj de mia unua artikolo povus supozi, ke mia opinio nur tiuj laboristoj estas kultur-itaj, kiuj krom sia metio havas intelektajn okupojn. Efektive, se tiajn ili ne havas, mankas al ili io, ili estas iel mense kriplaj. Sed ne tute: ĉar en ĉiu mana metio sin kaŝas (aŭ sin montras) iu intelekta aspekto. Ne necesas elvolvi tiun ĉi aserton: sufiĉas relegi Lanti, kiu pritraktis tiun temon pli lerte ol mi povoscias ("Vortoj", p.100-103).

Pli kriplaj estas puraj intelektuloj, kies scienco estas nur teoria, sen ia praktiko (mi ne rigardas kiel praktikon la manipulado de plumo, de tajpilo aŭ de mikrofono). Al ili mankas la intima kono de materioj, de iliaj proprajoj, de ilia rezistemo, de la ĝustaj rimedoj por venki tiun rezistemon per la homa mano kun konvenaj iloj. Al neniu metiisto oni povus kredigi, kiel al iuj "intektuloj", ke la gigantaj statuoj de Pask-insulo estis starigitaj sen materia kontakto, per la nura forto de homa menso kaj volo; aŭ ke per tiu nura forto oni povas tordi malvarman dikan ŝtalstangon.

Han Riner prave diris, ke ĉiu intelektulo devus perlabori siajn vivrimedojn per iu mana metio, kiel la filozofo Spinoza, kiu tajlis kaj poluris lensojn. Se tio ne estas ebla, oni almenaŭ konservu ian manan flankokupon: kultivi ĝardenon, fabriki simplajn meblojn, farbi murojn, glui vandpaperojn - segi, haki, fajli, triki, kudri, brodi, teksu... La "sinjorinaj

laboroj" de niaj avinoj ne estis tiel sensignifaj.

Pura intelektulo estas nur "homo sapiens". Mi pretendas, ke kompleta homo devas konservi ankaŭ ion el la karaktero de "homo faber". Tiu ideo kondukas min al tiuj modernaj arkeologoj, kiuj, por bone kompreni, kiel la prahistoriaj homoj fabrikis siajn ilojn, lernis mem splitigi ŝtonojn, tajli ilin kaj ilin poluri. Ili ankaŭ lernis fari fajron per frotado de lignopecoj, kio ne estas facila.

* * *

En mia tempo, ĉiu manlaboristo estis metiisto. Li posedis metion, t.e. teknikon kaj praktikon, ĉiam kun almenaŭ minimumo da teorio: pensu ekzemple pri la ŝtontajlistoj, la ĉarpentistoj. Nun, ĉe industriaj laboristoj pli kaj pli perdiĝas la neceso de mana lerteco. La homo jam ne manipulas ilojn senpere per la manoj, li pli kaj pli fariĝas gvidisto kaj komandisto de maŝinoj kaj robotoj, kiuj faras la taskon anstataŭ li. Eĉ kiam lia laboro necesigas intervenon de lia inteligento, ĝi, plejofte preparita en metodburoo, fariĝas rutina kaj seninteresa. Feliĉe, ĝi ankaŭ fariĝas pli efike produktiva, kaj tiel pli kaj pli ebligas mallongigon de la labortempo. La laboristoj akiras pli kaj pli longajn libertempojn kaj feriojn.

Por kio libertempoj? Ĉu nur por ripozo kaj simpla distriĝo? Ili baldaŭ fariĝus tedaj: la homo ja bezonas ekzerci siajn manojn kaj sian cerbon. Do ankaŭ kaj prefere per kulturo.

Kia kulturo? Ĉu nur intelekta (scienca, arta, literatura)? Ĉu ne kulturi ankaŭ la manlertecon, se tio pli kaj pli mankas en la panakira laboro? Ne hazarde venas de Usono la modo "do it yourself" (faru ĝin mem) kaj la reklamoj proponantaj praktikajn ilojn por mem labori permane.

Ne hazarde ankaŭ naskiĝis la modo pri "jogging" (alia usona importaĵo), la furoro de "norda ski-

ado", ks. La homo, liberigita de lacigaj taskoj, sentas la bezonon memvole ekzerci siajn muskolojn, kulturi ne nur sian cerbon kaj siajn manojn, sed sian tutan korpon.

Eble ni ĉeestas aŭroron de epoko, en kiu plene efektiviĝos la edukado per genia antaŭvido priskribita de Rabelezo jam en la XVIa jarcento. Bedaŭrinde liaj verkoj, tradukitaj, ankoraŭ ne aperis en esperanta versio. Kiuj scias la francan lingvon, tiuj legu aŭ relegu "Gargantua", ĉapitrojn XXIII, XXIV. Sub gvidado de la bona pedagogo Ponokrates, Gargantuo englutas multajn teoriajn sciojn, sed li ankaŭ praktikas plurajn manmetiojn kaj multajn sportojn. Rabelezo montras, ke kompleta homo, sen neglekti la cerbon, ne forgesas, ke li havas ankaŭ manojn, ankaŭ artikojn, nervojn, muskolojn en la tuta korpo, kaj ke ĉio ĉi bezonas ekzercadon por realigi individuan harmonion. Nur tia harmonio plene meritas la nomon kulturo.

Valo.

FOR LA FRENEZULON!

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Mi estis leganta la interesan artikolon de J. Claudel "For la dogmojn!" en la ĵus ricevita lasta n^o de "S-ulo", kiam Julio Štrumpfo sufloris min: "Ĉu ni forigu PI-on?" Mi ekmiris gapante, ĉu tiu frenezulo intencas senpapigi la Vatikanon?

- Kial vi gapas? li aldonis. Mi celas nur la sendogmigon de la litero Pi 3,1416.

Ne malpli ekmiro mi rebatis lin:

- Sed Pi ne estas dogmo; ĝi estas matematika evidentaĵo, neforigebla necesajo; kiel kalkuli cirklosurfacon aŭ cirkonferencolonon sen ĝi? Vi vere frenezas!

- Ĉu vere? Vi klarigu al mi pri la difino de Pi.

- Nu, ĝi estas la kvociento de la cirkonferenco per ĝia diametro.

- Kaj neracionala nombro, vi forgesis ĝin diri, kiu plej probable originas de empiria procedo. Mi tuj montros

al vi, ke la vera nombro Pi estas racionala ĉar devenanta de du entjeroj, kaj ke ĝia difino estas: kvociento de kvadrato, kies surfaco estas egala al tiu de iu cirklo, per la kvadrata radiuso de tiu cirklo.

- Sed necesas unue scii pri la veraj dimensioj de tiu kvadrato! Tie kuŝas la nodo pri la nesolvebleco de la cirklokvadrato!

- Tio estas nur alia forigebla dogmo.

- La cirklokvadrato, forigebla dogmo? Ĉu vi mokas min?

- Tute ne, kaj mi demonstros tion al vi poste. Sed necesas unue forigi la dogmecon de Pi. Por kalkuli la surfacon de cirklo, kion vi faras?

- Nu, unue mi kalkulas la kvadraton de la radiuso kaj multiplikas la produkton per Pi.

- Do, tiel farante, vi kalkulas nur la surfacon de kvadrato, kies latero estas la cirkloradiuso, kaj multiplikante per Pi, vi trovas nur la surfacojn de tri egalsurfacaj kvadratoj plus iom de iu kvara. Se vi estus multiplikinta per 4, vi estus ricevinta la surfacojn de 4 egalsurfacaj kvadratoj, kiuj kune konsistigas grandan kvadraton, kies latero estas la diametro de la cirklo, sed, pro la anguloj, pli ampleksan ol la cirklo. Necesas do trovi la ĝustan rilaton inter la kvadrato de la radiuso kaj la kvadrato, kies surfaco estas egala al tiu de la cirklo por ricevi la veran nombron Pi. Ĝi do ne estas rilato inter la cirkonferenco de la cirklo kaj ĝia diametro, kiel jam dirite antaŭe, sed rilato inter la kvadrato de la cirkloradiuso kaj la surfaco de la kvadrato, kies surfaco estas egala al tiu de la cirklo. Konsekvence, necesas nur scii pri nur unu dimensio de la cirklo aŭ de la kvadrato por atingi al ĉiuj aliaj sen uzo de la nombro Pi, kiu ne estas 3,1416 sed 3,1406, aŭ pli precize: 3,14053, ĉu ankoraŭ pli precize: 3,1405224. Tiu estas la racionala Pi.

- Mi emus konsenti, sed via teorio antaŭpostulas la solvodon de la cirklokvadrato.

- Jes! Almenaŭ tiun de la matematika solvo, de kiu dependas la geometria. Ĉar la vera problemo pri la cirklokvadrato konsistas el tio: de radiuso, nur per cirklo kaj liniilo, desegni cirklokvadraton, kies ambaŭ surfacoj estu egalaj.

- Sed tio estas agnoskita neefektivebla de jarmiloj fare de la fakuloj! Vi nur rigardu en ĉiuj vortaroj kaj enciklopedioj!

Oni povas demandi sin, ĉu tiu movado, kiu rilatas kun la nuna militdanĝero, estas netaŭga kiel kelkiuj diras aŭ skribas. Niaj eŭropaj landoj, oni diras, estas sendependaj de unu aŭ alia bloko. Kelkfoje oni aŭdis, ke la franca politiko estas farata en Parizo, la germana en Germanio, k.c. La armilaro de tiuj landoj povas esti direktata norden kaj suden, orienten kaj okcidenten. Nun oni devas trovi la malamikon; nepre (kaj delonge) oni bezonas malamikon. Norde ne estas problemo, ĉar estas malfacile trovi malamikon tie; sude estas io; sed oni lokas tion en duan planon, sufiĉas nun liveri kelkajn aferojn, atendante pli bonan okazon. Okcidente estas nia amiko Usono; pensu, ke la usona mono ordigas la nian (unu ekzemplo inter aliaj). Ni ĉiuj scias, ke tiu lando ne bezonas krudaĵojn. Ŝajnas, ke jam kelkaj eŭropaj landoj ricevas gason kaj aliajn aferojn de ni bezonatajn. Oni ne plu bezonas paroli pri problemoj de la krudaĵoj, kiujn niaj landoj devas importi. Kiam krudaĵoj mankas, povas esti konflikto inter landoj, sed ni devas trovi ion, kio povas montri tiun landon kiel malamikon. Ne estas evento en la mondo, en kiu S.U. ne aperas; eĉ kun la kubanoj. Se iu lando volas liberiĝi de siaj subpremantoj, tuj oni vidas, ke S.U. estas tie, aŭ instigis tiun liberiĝon; sufiĉas, por ornami la bildon, ke la ŝtataj perfortuloj krii, ke ili faras sian laboron kontraŭ la marksismo kaj ke tiuj, kiuj ne samopinias, estas komunistoj aŭ favoraj al ili.

Eble estas vere, ke la influo de socialismo, kiun en 1917 disvastigis la oktobra revolucio, efikas en tiuj liberiĝoj, ekzemple en Centrameriko. Sed la malamikeco ne komenciĝas nun. La komenco situas, kiam okazis tiu revolucio, pri kiu iu skribis "La dek tagoj, kiuj skuis la mondon".

Oni rakontas, ke en tiu epoko, anglaj, francaj kaj usonaj trupoj estis senditaj al Rusio por helpi la kontraŭrevoluciulojn. Proksimume dek jarojn

poste oni preparis militon, kiu finfine estis direktata kontraŭ la vera malamiko, Sovetunio. Pruvo estas, ke ĵus antaŭ la komenco de tiu dua mondmilito oni enkarcerigis unue la komunistojn, poste la progresemulojn. Kaj post la militfino oni nomis la francan komunistan partion la partio de la pafmortigitoj.

Mi haltis por legi la ĵus alvenintan "Le monde libertaire", senditan al mi de mi ne scias kiu. Mi legis artikolon, kies titolo estas "La mensoguloj". Oni povas elekti, plej parto el tiu n-ro estas verkita kontraŭ la komunistoj kaj tiuj, kiuj, ne konsentante pri ĉio, volas pacon.

Leginte ĝin, mi devis ordigi la ideojn en mia kapo, dum granda momento, pro miro. Ĝenas la verkiston intervjuo de finlandano Kati Hannihainen, en oktobro '81, kaj li citas ŝian deklaron: "Ni tre bone scias, ke estas armilejoj militaj en ambaŭ flankoj... ni batalas por ĝenerala malarmiĝo kaj ni estas kontraŭ la raketoj de ambaŭ flankoj... sed ni estas konvinkitaj, ke Usono estas respondeca pri la vetarmado. S.U. nur sekvas kaj ĝi estus malprava ne fari tion."

Kaj sekvas perloj el la plej ranca antikomunismo, kiel "La Führer Breĵnev", "la lakeoj de la soveta imperialismo" (tio, koncerne la 300 000 pacemajn manifestaciantojn en G.F.R.). Sekvas ankaŭ praviganta senkulpiĝo pri ilia (de la anarkistoj) nepartopreno en tia movado. Li diras: "Nenian kuniĝon, do, kun la ruĝaj faŝistoj". La artikolo estas preskaŭ plenpaĝa per la sama prozo; mi ne plu kopias. Mi rimarkis ke kelkaj el tiaj "perloj" estas ripetitaj en la artikolo, kvazaŭ la verkisto volus konvinki sin.

Mi pensis esprimi mian opinion sammaniere kiel S-ino K.H. Pro tio, ke kiam oni perdis 20 milionojn da homoj kaj tiom da homoj kaj vilaĝoj pro milito, kiun oni ne volis, oni rajtas ŝirmi kaj defendi sin. Tio povas plaĉi aŭ ne, sed la kontraŭo ŝajnas nelogika. Plue, ĝis nun, nur ili parolas pri paco.

Mi kutimas legi ĉian literaturon, varian; sed mi agnoskas mian nekomprenon, legante skribaĵojn de homoj

sin konsiderantaj veraj demokratoj, kontraŭ aliaj homoj, kiel la komunistoj, kiuj delonge kaj ofte montris sian sindonemon kontraŭ ĉia milito kaj por la defendo de la laboristaro.

Kompreneble, ne ĉio estas dirita en tiu artikolo (aŭ duonrespondo) ; sed mi ne ŝatas disputon inter homoj, kiuj devas klopodi kiel eble plej por pli bona kunvivado.

Petro.

Maurice CRANSTON :

Imaga Dialogo Marks/Bakunin

JUS APERIS

(trad. D.C, 32 paĝoj)

Kun Marks/Bakunin ni penetras en tiklan kampon : tiun de la homo kaj de ties socia vivo. Ĉiama fonto de sangaj kvereloj. Ĉu "faru, kion ci devas fari", tio estas "kion ordonas la ŝtato" de Marks, ĉu "faru, kion al ci plaĉas" aŭ "for la ŝtaton!" de Bakunin ?

Pri la unua, la historio jam montris la troigojn, kaj pri la dua oni povas dubi, konsiderante la homan sintenon, kiel substrekas Louis Louvet en mallonga kaj interesa enkonduko.

Tia temo facile povas esti kapdoloriga kaj osceda por nefakulo. Maurice Cranston mildigas la necesan sciencan rigoron, prezentante la du aktorojn en imaga dialogo kun tute brita humuro. Ĝin disaŭdigis B.B.C. en 1962. Tiun 32-paĝan libron esperantigis D.C. en lingvo klara kaj leĝera.

Kiel ĉiam la prezo estas fenomenala : 4 FF !

J.C. Gionco.

(Eldonita de SAT-broŝurservo)

* *

"Enkonduko en la Kulturon", broŝurserio eldonata de Portugala Eldona Rondo :

Ĉiu el ni aŭdis pri Suez-kanalo kaj pri tiu de Panamo, scias ilian utilecon. Sed ĉu ni scias kiom da baroj financaj, politikaj renkontis ilia realigo, kiom da suferoj ili kostis - ĉefe Panamo. Necesis entuziasmo, kuraĝo, honesteco, persistemo. Ĉion tion larĝe posedis Ferdinando de Lesseps. Sed "eta detalo" fiaskigis la panaman projekton, kiel sciigas al ni Profesoro Agostinho da Silva en sia "Vivo de Lesseps", bonstila libreto, absorba kiel aventurromano.

"Vivo de Alexandre Herculano" (pr. Aleŝandre Herkulano) prezentas alian homon de l'estonteco, kiu sin dediĉis al tasko multe pli malfacila ol konstruo de kanalo, parole kaj fare instrui liberon al siatempaj portugaloj, kaj krei bazojn de nova socio. En tia entrepreno la progresoj estas malrapidaj, la akiroj neniam definitivaj, la refaloj oftaj, tiom potencaj estas la kutimfortoj, tiom granda la homa inerteco.

Legante la vivon de tiuj du eminentuloj oni vidas kiom decidaj estas la vivmedio, la edukado hejma kaj lerneja en la konstruo de personeco. Ni konstatas, ke Lesseps estis el familia aventurema, persistema, inteligenta, kuraĝa. Same por Herculano, kiu krome ricevis edukadon en instituto "...kie arde oni amis liberon, individuan dignon, sian proksimulon, oni sin montris adepto de kritikemo, malfavoraj al ĉia dogma instruado, kie oni preferis eksperimentojn de fiziko ol retorikon..." Do la demando estas jena : Kiel instrui por krei homojn liberajn samtempe zorgajn pri la komunaj bono kaj progreso ?

"La Lernejoj de Winnetka" en 1919 alportis sian kontribuon al la solvo de tiu problemo. Tiun eksperimenton priskribis Prof. da Silva en 22-paĝa libreto. En ĝia fino kvar titoloj (en la portugala, hispana, angla) konsistigas priteman bibliografion. Por francoj ne forgesi "L'Ecole Freinet" kaj por ĉiuj "ICEM-Esperanto" (Saint-Puy, F 32310 Valence sur Baïse).

Resume, malgraŭ la malperfektaĵoj jam menciitaj, dankon al la Portugala Eldona Rondo pro tiuj tri meditoj, kies aĉeton mi konsilas, je la kondiĉoj kaj ĉe la adreso donitaj sur p. 23a de la lasta "Laŭte!" (Februaro/Marto 82).

J.C. Gionco.

kiel instrui e-on ?



Noto de la red. : Simeon Hesapĉiev, bulgara esperantisto, gvidis kursojn por komencantoj, por progresintoj kaj por instruistoj de Esperanto, ne nur en Bulgario sed ankaŭ en Pollando, Hungario kaj eĉ en la Muelejo de metilernantoj en Piot, Francio, 1967. En 1968 li verkis kaj multoblis notojn pri sia instruometodo, el kiuj "Laŭte!" publikigas ĉi-poste la ĉefan parton.

Simeon Hesapĉiev :

MIA PRAKTIKO EN LA INSTRUADO DE ESPERANTO

... Mi instruas ne ĝuste laŭ mia lernolibro, sed laŭ propra praktika metodo, aplikante jenajn ĉefajn principojn :

1. La vortaro de elementa kurso estas malgranda kaj konkreta : antaŭ ĉio mi uzas vortojn signifantajn objektojn, kiujn mi povas havi en la klasĉambro aŭ porti kun mi : kreto, libro, kraĵono, kajero, pordo, fenestro. En Druĵevo, kie ni manĝas kune, mi nepre uzas la vortojn telero, taso, forko, kulero. La kraĵonoj estas tre oportunaj, ĉar ili okupas malgrandan lokon, estas porteblaj kaj havas diversajn kolorojn - mi uzas ilin ĉe demandoj kaj respondoj kun adjektivoj : Kia estas la kraĵono ? La kraĵono estas ruĝa, flava, verda, ktp. Proprajn nomojn mi uzas laŭ la lando kaj la regiono - ili devas esti konataj al la kursanoj / aŭ mi uzas la nomojn de mondkonataj urboj, insuloj, poetoj/. En Pollando mi uzas la nomojn Warszawa, Wroclaw k.a. La nomojn de urboj mi uzas ĉe la gradoj de komparo. Internaciaj vortoj : aŭtomobilo, maŝino, aparato, metalo, lampo, kartono, elektra lampo. La lampo ne estas petrola, sed estas elektra. Metala skatolo, kartona skatolo. La vortaro de la kurso por komencantoj ĉe la Centra domo de la instruisto en Sofio dum 1964/1965-jaro havis 610 vortojn (250 el ili estas derivitaj).

2. Per la malgranda vortaro ni faras multajn kombinojn :
La kraĵono estas ruĝa, la kraĵonoj estas ruĝaj, ruĝa kaj flava, ruĝaj kaj flavaj, ruĝa kaj flavaj, ruĝaj kaj flava, ruĝaj, flava kaj verdaj, ruĝa, flavaj kaj verda ktp. Per la praktiko kaj en la praktiko mi venis al maniero, kiun mi nomis ripetado en rondo :
Kio estas tio ? - Tio estas libro. - Ĉu tio estas libro ?
- Ne, tio ne estas libro, sed estas kajero. - Ĉu tio estas kajero ? - Ne, tio ne estas kajero, sed estas kreto. Ĉu tio estas kreto ? - Ne, tio ne estas kreto, sed estas fenestro. Oni povas veni al la unua objekto kaj rekomenci la movon (la demandojn kaj la respondojn). "en rondo".
3. La kursanoj partoprenas per aŭskultado, rigardado, skribado, parolado (tuŝado), movoj. Tiamaniere ilia konscio pleniĝas tra kelkaj pordoj. Ĉe la instruado mi uzas multajn objektojn. La kursanoj rigardas ilin. Ili rigardas ankaŭ la skribaĵon kaj mem skribas. Ili aŭskultas min kaj siajn kamaradojn ĉe la instruado, ĉe deklamado, ĉe kantado. En la komenco ili parolas ĥore kaj poste ankaŭ individue. Ili mem palpas (tuŝas), prenas, donas, montras diversajn objektojn. Mi cirkuligas objekton inter ili : kraĵonon, libron, skatolon kaj demandas : Kion vi faros, faris, kion li (ŝi) faros, faris ? Ili respondas : Mi donos al li la kraĵonon, li prenos la kraĵonon de mi, mi donis al li la kraĵonon, li prenis de mi la kraĵonon, ktp.
4. En elementa kurso mi ne donas ĉiujn detalojn de la gramatiko, ekz. prefiksojn bo-, fi-, mis-, retro-, sufiksojn -aĉ, -ĉj, -nj, -end, -iz. Mi ne donas plenan sistemon (tabelon) de la participoj kaj la korelativoj, sed pri ambaŭ temoj en kursoj por progresintoj mi faras teoriajn lecionojn po du lernhoroj (90 minutoj) kun multaj ekzemploj kaj komparoj.
5. Mi gvidas la elementajn kursojn praktike (parole). La kursanoj respondas ne nur ĥore, sed ankaŭ individue. Laŭ la bezonoj kaj la eblecoj poste mi iom post iom transiras al teoria instruado. Celante ricevi respondon de ĉiuj kursanoj, mi lasas la timemajn en la fino - post kiam ili aŭdis la respondon kelkfoje.

6. Ripetado estas plej bona lernado. La vortojn oni devas multe ripetadi en diversaj kombinoj - 30, 40, 50 fojojn. Malmulte ripetitajn vortojn mi ne konsideras ellernitaj kaj memorataj. Iujn vortojn oni povas ekmemori de kelkfoja uzo, aliajn pli malfacile. Neniam oni devas plenigadi la memoron perforte.
7. Bonega rimedo por ripetado estas la kantado. Dum unu kurso mi instruas 6-8-10 kantojn. La tekstojn de la kantoj mi skribas sur grandaj folioj aŭ sur la nigra tabulo (iam mi uzas specialan duan tabulon por la kantoj), ofte mi lasas la tekston je la dispo de la kursanoj, ke ili transskribu ĝin.
8. Mi ligas la kursanojn kun la loka esp. movado, kun la landa kaj la internacia movado per korespondado, ekskursoj, renkontoj, ktp. La stereotipan unuan leteron mi akompanas per mia letero kaj sendas al persone konataj aktivaj esperantistoj. Respondoj baldaŭ venas kaj kuraĝigas la kursanojn.
9. Ĉe la lecionoj mi uzas la helpon de malnovaj esperantistoj, sed nur kiam mi bezonas, ne kiam ili volas.

* *
*

Gvidante kursojn por instruistoj de Esperanto, mi mem instruas al malgranda grupo da komencantoj. Poste ni pridiskutas miajn lecionojn. Kun mia helpo ĉiu kursano preparas lecionon, instruas al la komencantoj kaj poste ni pridiskutas lian lecionon. (...)

Por la kursoj por progresintoj (kiam ili ne estas tro teoriaj - por finintoj de komencaj, elementaj kursoj) por paroligi kursanojn, mi havas kelkajn kompletojn de bildoj - iuj estas destinitaj por verkado en gepatra lingvo, aliaj - en fremdaj lingvoj, inter la bildoj estas urba strato, fervoja stacio, kamparaj laboroj, somera tendaro apud la maro k.a. Ĉe iuj bildoj oni nur priskribas, ĉe aliaj oni devas rakonti, pensante ankaŭ pri momentoj pli fruaj kaj momentoj post tio, kio estas prezentita sur la bildoj.

En la kursoj por progresintoj ĉe la Centra domo de la instruistoj en Sofio, en Druĵevo kaj aliloke ni faris vortarojn de la apartaj bildoj kun 70-80-120 vortoj. Interesa ekzerco estas priskribi unu bildon (aŭ rakonti laŭ ĝi) per diversa

nombro da vortoj. Tio estas necesa laŭ la nivelo de la kursanoj en diversaj kursoj.

Foje, rigardante unu bildon, ni faris liston de 70 vortoj. Kiam ni komencis verki rakonton laŭ la bildo, ni forigis la duonon de la vortoj kiel superflujaj kaj aldonis proksimume same tiom. La unuan vortaron ni nomis statika (priskriba), la duan - dinamika (rakonta).(...)

Simeon Hesapčiev

La "P A C O L I B R O" de B. Benson
(daŭrigo)

Ĉiudimanĉe, kvar gekamaradoj de la Eysines-grupo (Ĝirondio) partoprenis en kunvenoj organizitaj de la "Pacolibro"-asocio. Nia partopreno daŭris nur ĝis la 16a de marto. La 20an de marto, okaze de la kunveno de la

bordoza E-grupo, interkonsente, ni decidis ne plu daŭrigi la agadon.

Alvokite de la ĝironda respondeculo de AILP (internacia asocio por la Pacolibro), dezirante helpi ilin, ni ĉeestis la kunvenojn ĝis la 7a de marto. Kiu estas la E-istoj neinteresataj kaj-motivataj pri la paco? Okaze de la unuaj kunvenoj partoprenis pli ol tri dekoj da personoj nekonataj de ni, venante el tre malsamaj medioj. Plena de bonvolo, ĉiu helpis laŭ siaj kapabloj. Okazis afiŝgluado por informi pri la projekcio de la filmo "La bombo". Oni petis de ni, Esperantistoj, glui du trionojn el la afiŝoj; kiam oni dispartigis la afiŝojn, ni kunprenis nur tridek, kiel la aliaj kamaradoj!

Post la filmprojekcio nur deko da personoj venis en la kunvenon kaj kelkaj inter ni faris demandojn, ekz-e: "Kial ne krei federacion arigantan la diversajn asociojn kiel la Pacista Unuiĝo, la CAN (antinuklea komitato), la Movado por la Paco, la sindikatoj, ktp?"

Respondoj:

- eksmoda estas la Pacista Unuiĝo, ĝiaj aktivuloj estas maljunaj, ktp;

- la CAN: ni ne povas akordiĝi kun tiuj personoj!

- la Movado por la Paco estas komunista!

- la sindikatoj: ne politikigu la aferon!

Rapide ni komprenis, ke la decidoj venis el AILP en Parizo, kaj eble aliloke.

Iun dimanĉon, la respondeculo montris al ni artikolon pri Benson, skribita en "Le Monde Inconnu", revuo eldonata de Rozkrucismo*. Nune afiŝegoj pri "Le Monde Inconnu" flagas la bordozaĵn stratojn. Onidire la reklamado kostas po 5000 FF por ĉiu panelo ĉiusemajne! La respondeculo demandis nin, ĉu la E-movado estas riĉa. Kia ironio!

Fine, la atenditaj flugfolioj alvenis (pozitiva agado ne kontestita de ni). K-do kunportis nur duonon de la antaŭviditaj flugfolioj. Denove, alvoko al la bonvolontuloj kaj al la malavaro de ĉiuj por presigi la mankantajn flugfoliojn.

Kiel ni, same gek-doĵ de MDPL, sindikato, ktp, partoprenis en la agado ĝis la disdonado de la flugfolioj en la lernejoj la 16an de marto.

Kio okazos poste? Ni ne estas Nostradamo! Ĉu la pacistaj movadoj, tiuj kiuj vere batalas por la paco de multaj jaroj, estos oficiale kunvokitaj por labori, decidi pri la venontaj agadoj en la Benson-movado? Ĉu oni devas kredi pri tio?

Se en sia urbo, E-istoj partoprenis en tiu agado, ili bonvolu skribi siajn impresojn pri tio. Tio tre interesas nin. Antaŭdankon.

Ginette.

N.B. Se vi deziras aĉeti la "Pacolibron" dediĉita de BENSON, direktu vin al la revuo "Le Monde Inconnu"...!

* Laŭdire, la imaga persono Rosenkreuz, origine de Rozkrucio, aperis en la unua skribita dokumento, la fama "Fraternitatis" en 1614. Oni povas kompari tiun protestantan movadon al la fama germana inkvizicio, pri kies multaj viktimoj oni parolis. Ĝi rilatis kun la "Teŭtona" ordeno, kiu venigis la Thule-grupon kun aĉa famo... (eltiraĵo el artikolo aperinta en la libera informgazeto "La Rose des Vents" n°5 - La Rose des Vents, place du Foirail, F 82190 BOURG DE VISA.)

Ĉ U V I
*****S C I I S ?

G.F.R. - Oni konstruos uzinon por retraktado de la nukleaj ruboj en Fed. Germanio je 30 km de CHOOZ. Malmulte da detalaj informoj pri tio, sed la lukto organiziĝas en Francio kaj en Germanio.

Three Mile Island - Nova radioaktiva gas-likado okazis en Three Mile Island la 9an de januaro 1982. La dungitaro estis evakuita. Oni ne malsekretigis la akcidentkaŭzojn.

Ontario-ŝtato de Nov-Jorko - Ankoraŭ akcidento en la centralo de "Ginna" en Ontario la 25an de januaro 1982 pro rompiĝo de la malvarmiga sistemo. Malgranda kvanto da radioaktiva vaporo ellasiĝis en la atmosferon. Tridek mil litroj da radioaktiva akvo disversiĝis sur la grundon de la reaktora ĉambro, sekve la reaktoro estis haltigita. 150 laboristoj estis evakuitaj, 15 aliaj devis esti flegataj pro absorbo de radioaktiva dozo. Kelkaj ekspertoj antaŭvidas gravajn fendojn en la centralo-konstruaĵo pro la subita halto de la reaktoro. La oficiala motivo de la akcidento estus korodado.

(Eltiraĵoj el "Braud dernière" gazeto de la bordoza C.A.N., 12 rue Planterose, F 33000 BORDEAUX. Traduko)

Deziras korespondi :

* S-ino Irena MARKOWSKA, 91-431 ŁÓDŹ
ul.Boj. Getta Warszawskiego 5 m.31 POLLANDO.

* Pri agrikulturo, muziko, lingvistiko, preferinde kun Japanio, Sudameriko, Ĉinio, Danio : Filipò MONTADE,
5 rue Lacuée, F47300 VILLENEUVE SUR LOT, FRANCIO

Eblas peti senpagan broŝuron pri la lapona popolo kaj biografion de la teatra verkisto kaj individuista filozofo Henrik IBSEN al jena adreso :

Rega Norvega Ministerio de Eksteraj Aferoj, OSLO
Norvegio.

Maljunulo rakontas :

"NENIU ESTAS PROFETO EN SIA LANDO"

Fine de mia studado tuta kolegaro interkonsentis de tempo al tempo, okaze, nin amike interviziti, kie ajn ni estos, - ĉie en la mondo.

Iu el miaj kolegoj asertis : "Mi fariĝos fabrikestro." Tempon poste li ne trovis laboron en nia lando ; li malaperis...

La vivo nin instruas, ke la sistemo de vivo antaŭiras pli rapide ol la ritmo de lernado, sed tion oni ne diris al ni dum nia pasinta lernado.

Kiel studentoj ni estis ĉiam kontraŭ la severaj profesoroj. Ni estis "maldekstruloj", ĉar ni opiniis, ke malgraŭ ke ni ne scias iun maloftan escepton de la gramatiko aŭ alian regulon, tio al ni ne malhelpos fariĝi tre utilaj membroj de la socio. Nu, dudek jarojn proksimume post tiu lasta kunveno, mi renkontis en iu malproksima ĉefurbo la ekskolegon fariĝintan estro de malgranda uzino, ĉi tiun kolegon, kiu asertis siatempe, ke li volas fariĝi "fabrikestro"...

Li min invitis siahejmen por pasigi kune la dimanĉan posttagmezon. Pro tio li kaj lia edzino kaj mi forveturis en lia bela aŭtomobilo al la plej multekosta kafejo de la urbo. Ĉe nia alveno antaŭ la kafejo, la tre belaspekta pordgardisto demetis sian kaskedon, kun profunda kliniĝo, malfermis la pordon de nia aŭtomobilo, malfermis la pordegon de la kafejo, celante ricevi neeviteblan trinkmonon, kiun li ja ricevis de mia amiko. Poste, dum nia interparolado, mi demandis mian ekskolegon, ĉu li estas ĉiam "maldekstrulo" kiel ni ambaŭ, dum la kelkaj jaroj de nia komuna studado.

Li min respondis : "Ne, mi nun estas dekstrulo".

Mire mi lin demandis : "Pro kio vi ŝanĝis vian politikan opinionon ?". Li al mi memorigis : "Ĉu vi vidis, ĵus antaŭ nia eniro en ĉi tiu kafejo, la pordgardiston ? Antaŭ 18 jaroj mi estis ĉi tie, en TIU KAFEJO, mi faris lian laboron... Alvenante kiel senlaborulo, mi estis devigita labori kiel telerlavisto kaj poste, kiam la ĉi-tiea estro aŭdis, ke mi scipovas aliajn lingvojn, li min nomumis pordgardisto kaj samtempe interpreto. Tio ebligis al mi vidi tion, kio mankas en tiu ĉi lando, trovi mian situacion, kiu hodiaŭ al mi, post 18 jaroj, ebligas trinki, manĝi, doni trinkmonon kaj vin akcepti ĉi tie."

Poste, foririnte, ankaŭ mi serĉante laboron konfirmis al mi la malnovan proverbon "Neniu estas profeto en sia lando"... -nn-

EL PORTUGALIO

Portugala Eldona Rondo, Rua Anselmo Braancamp, 259
4000 PORTO - Portugalio, plu mitrale broŝuras !
Krom la tekstoj, pri kiuj jam aperis recenzoj en "Laŭte!"
ni ricevis :

7. La Stoikismo (A. da Silva)
8. La Petrolo 9. Vivo de Pierre Curie 10. Surgrimpo
en Himalajo (Ĉiuj verkitaĵoj de Agostinho da Silva kaj
tradukitaĵoj de Manuel de Freitas aŭ de José de Freitas
Martins). La venontaj tekstoj (ĉiam de A. da Silva) estos:
11. Vivo kaj arto de Van Gogh 12. La lumgaso 13. Vivo
kaj arto de Ticiano 14. La penso de Epikuro.

Ĉiu broŝuro, ofsetita, kostas 2 irpk, inkluzive afrankon.
Por 10 ekzempleroj, 20% rabate.

La abonombro plu kreskas kaj nun atingis 310.
Estas 70 novaj gelegantoj, kiuj espereble iĝu
ankaŭ kunverkantoj. Inter la 310 troviĝas 27
abonoj iel "donacitaj" de geLaŭtuloj, kiuj
samtempe indikas la nomo(j)n de l'favorato(j),
aŭ simple ĝiras krommonon al "Laŭte!", kies
kasisto, konante kelkajn adresojn de nepagipov-
antoj, tiel povas tamen registri ilin kiel
abonantojn. Dankon al ĉiuspecaj donacantoj !

* *

Nun, pro (aŭ dank'al ?) la pligrandigo de la
eldonkvanto, eblas antaŭvidi la baldaŭan ofset-
igon de "Laŭte!". La ofsetilo ekzistas, funkci-
kapabla ; la multobliganto jam alsturmis ĝin
plurfoje kun rezultoj komence iom elrevigaj, sed
poste pli kuraĝigaj. Nu, kuraĝe antaŭen ! Li
- espereble - povos transpasi la Rubikonon
fine de junio, por la venonta numero.

* *

Tiu numero entenos la Adresaron 1982. Urĝas nun
sendi aldonojn kaj modifojn al via adreso !
Pli kaj pli pensu, ke desegnoj estas bonvenaj !
Ĝis ! Kribo

VIVO DE "LAŬTE!"

E-VIVO

La 55a Kongreso de S.A.T.
(Sennacieca Asocio Tutmonda)
okazos en IISALMI - Finnlando
de 31.7. ĝis 6.8. 1982

Programo : Krom la kutimaj asociaj kunsidoj dediĉitaj al
la bilanco kaj agadplano, okazos fakaj kaj frakciaj kun-
venoj (Naturamikoj de TANEF, Anarkiistoj, Pacistoj, k.a.)
kulturaj vesperoj, ekskursoj, renkonto kun lokaj laboristoj,
debatoj...

Du postkongresaj arangoj :

1. Ekskurso en Laponio de la 7a ĝis la 9a de aŭgusto.
2. Vojaĝo al Leningrado de la 7a ĝis la 10a de aŭgusto.

Loĝado : en altnivelaj aŭ modestaj hoteloj, en kampadejo,
aŭ amasloĝado en la kongresejo mem.

Mangoj : en la kongresejo funkcias kafejo la tutan tagon.
Ankaŭ tagmangado eblas tie.

Adreso de la Organiza Kongres-Komitato (OKK), al kiu peti
aliĝilon kaj pliajn informojn : O.K.K. 55a SAT-Kongreso,
Louhenkatu 5, SF-74100 IISALMI.

Federacia Kongreso "Langvedoko-Katalunio"
en PERPIGNAN (Francio)

La jara federacia kongreso Langvedoko-Katalunio okazos la
8an kaj 9an de majo 1982 en Perpignan. Sabaton la 8an je
20H30, en la sidejo de la Kataluna Kultura Centro, 2 str.
Saint-Mathieu, profesoro BEAU el Aix-en-Provence prelegos
pri la Malta insulo per diapozitivoj. La "Gajaj Trobadoroj"
ludos kaj kantos "La Espero"n kaj diversajn folklorajn kan-
tojn. Dimanĉon, la 9an je 9H30, malfermo de la Kongreso ĉe
la Kataluna Centro kaj Amika tagmango, 4 strato Franklin.
Posttagmeze vizito de la muzeo pri artaj kaj popolaj tradi-
cioj (Monumento Castillet).

Informojn donas la esperantista kultura centro, 72 avenuo
Général de Gaulle, F 66000 PERPIGNAN. Tel. (68) 34 22 18.

De Radio Pekino ni ricevis sonbendon registritan surloke, do
perfektan (du elsendoj). Se vi deziras aŭskult(ig)i ĝin, ni
povas kopii ĝin, kaj eĉ aldoni parton skribe, por ke la ko-
mencantoj povu pli facile sekvi. Kosto : 20 FF, inkluzive de

la sendokostoj. Bv. sendi poŝtĉekon sen dato al
LENTAIGNE, 3 av. Gaillarde, F 34000 MONTPELLIER
pĉk: 466 99 F MONTPELLIER.

Novo Esperanto-poŝtkarto ĉe AEM, A-1014 WIEN, Hofburg. (*)

Aŭstria Esperanto-Movado sukcesis eldoni poŝtkarton pri
aŭstria Esperantaj monumentoj. 10 ekzempleroj kostas
7 internaciajn respondekuponojn aŭ 5,70 hfl aŭ egalvalore.

ĜEMELA RONDO SERĈATA!

"E-Rondo de Totyô, unu el la plej prosperaj rondoj en
TOKIO, konsistanta el kelkdek aktivaj membroj, nun etendas
sian manon mondscale al eksterlandaj Esperanto-Rondoj.
Por detruo ŝelon de japana E-movado, kiu onidire emas fer-
mi sin en sia lando, atendata estas via kunlaboro. Esperan-
to vere funkcio kiel internacia komprenilo!"

Tiu alvoko ĵus aperis en la 9a numero de "Ankoraŭsen-
noma Gazeto" (vd. antaŭajn "Laŭte!"). Sekvas pli detala pro-
pono:

"Ni volas korespondi kolektive kun iu esperanto-grupo,
kiu havas la saman celon kiel la nian. Pli konkrete dir-
ite ni deziras interŝanĝi bultenojn aŭ similajn, en kiuj
korespondaĵoj publikiĝu ĝuste kiel en ĉi tiu Ankoraŭsen-
noma Gazeto. Ni opinias, ke pere de tiu kolektiva kores-
pondado ni povos regule interŝanĝi opiniojn kaj plipro-
fundigi interkomprenadon, kio naskos veran respekton inter
ni kaj interpopolan amikecon, sur kiuj baziĝus stabila
mondopaco.

"Se iu trovos dum la kolektiva korespondado tiun, kiu
havas kiel li la saman opinion aŭ interesadon, li povos
korespondi kun li private. Ni esperas, ke via rondo kon-
sentos pri tiu propono. Pli detalaj kondiĉoj kaj rimedoj
estu traktataj poste, por ke tiu entrepreno iru glate
kaj efike. Ni atendas vian aktivan reagon."

Laŭtuloj kaj Laŭtulinoj, ne mistrafu la okazon!

Jen la adreso: Esperanto-Rondo de Totyo ĉe Esperanto-Domo
Sone-biru 502, Yoyogi 3-46-17, Sibuya-ku, TOKIO 151,
Japanio.

(*) Batthyanystrasse

E-VIVO en ĜIRONDIO

La 3an de aprilo, posttagmeze, ni kunvenis en la kulturcentro
de EYSINES. Dudeko da gekamaradoj ĉeestis.

1. Nia ekspozicio vagadas tra Ĉarentio. Iu instruisto (en ko-
legio) ekspoziciis en la biblioteko de sia kolegio en
MONTLIEU. Ĉiuj gelnantoj vizitis ĝin. Poste ĝi estis
starigita en la kolegioj de MONTGUYON kaj de SAINT-AIGULIN.
La geknaboj almenaŭ scias la ekziston de Esperanto.
2. Golfech. Ginette parolis pri la internacia manifestacio,
kiu okazos la 29an kaj 30an de majo. Kune kun kelkaj amikoj
ŝi deĵoros ĉe E-budo.
3. Festo de la Socialista Partio. Kutime nia grupo ĉeestas kaj
deĵoras ĉe budo. Ankaŭ ĉi-jare ni estos invititaj sed la
daton ni ankoraŭ ne scias.
4. Kermeso en Bordoza Parko. La profito de tiu kermeso iras
al la malfavorataj infanoj de Girondio. Kion vendos nia
budo? Verŝajne ni faros mondonacon al la organizanta asocio.
5. Pri fremdaj lingvoj. Leo informis pri enketo koncerne fremd-
ajn lingvojn farita de la Sindikato por Geinstruistoj (SNI).
Tiu enketo ne notis Esperanton. Li mem reagos.
6. Internacia ekspozicio per desegnoj. La iniciatinto, pere de
Esperanto, jam ricevis el la tuta mondo pli ol okcent deseg-
nojn. Staros tiu ekspozicio en "Ĉies Domo" de CENON-Palmer
de la 4a ĝis la 15a de majo.
7. Liberaj Radioj. Leo kaj Henriko kunlaboros por prepari ka-
sedon por prezenti Esperanton pere de Libera Radio en
Bordoza.
8. Brazilio. Samideano Mesplède partoprenis, pasintjare, la
Universalan Kongreson en Brazilio. Li legis al ni siajn Sud-
amerikajn travivaĵojn. Ni estu fieraj, en la Brazilia ĉef-
urbo la franca ambasadejo estas vere vidinda!
9. Venontaj grupkunvenoj:
 - * en majo, la 22an je la 15a horo en la festsalono de
GUJAN-MESTRAS. Por pliaj detaloj vi skribu al Petro SEVILLA
108 cours de la Marne, 33470 GUJAN MESTRAS.
 - * en junio, la 26an en MARCENAI. Ni piknikos ĉe la river-
bordo.

Ĝis ! Joël

M A R Ĝ E N E D E L A 3 7 a.

Lastjare, parolante pri la 36a Kongreseto de nia SAT-Amikaro, mi diris, ke ĝi estis la plej bone organizita. Nu la 37a estis tiel bone organizita kaj en vere belega kastelo de Rajat. Honoro kaj gloro al O.K.K. ! Ja la pejzaĝo de Rajat ne kompareblas kun la panoramo, kiun oni havis ĉe Anecia Lago, sed kia kastelo kaj kia manĝaĵo ! (mi parolas pri normalaj menuoj, ne por vegetaranoj...) Ni vere lukse manĝis ! La akvo ne estis rimarkinda, sed kia bonega vino komparinda al plej bonaj Beaujolais, Côtes-du-Rhône aŭ Bourgogne ! Mi pravas, dirante, ke ni povos iri de kastelo al kastelo sen renkonti la saman !

Ĉiuvespere okazis koncerto, mi rimarkis junulon, kiu delikate ne timis miksi ĉiujn plezurojn kaj lia glaso da bonega vino akompanis lin ĉie. Tiel li havis vin-koncerton : sabate kun klarnetoj, dimanĉe kun mezepok-muzikinstrumentoj, lunde kun la nova esperanto-kanzonisto, kiu rave gitare akompanas sian belan voĉon. Max-Roy estas la unua kanzonisto uzanta esperanton en siaj diskoj, kiujn oni trovas en la diskotekoj. Oni devas kuraĝigi lin, kiel faris nia SAT-Amikaro por la unua disko, kiu jam estas sukceso.

Nun, apud libroj kaj broŝuroj, oni vidos pli kaj pli diskojn aŭ kasedojn. Tiel laŭplaĉe ie kaj iam ajn vi povos aŭdi kanzonojn de Max-Roy aŭ la tre interesan prelegon de Levreaud pri Julio Vallès kun (tro da) komentoj de nia genia gramatikisto, kiu ne povas esti modelo por norma prononcado. Mi ŝatas paroli pri tiu norma prononcado de nia sennacieca lingvo, dum mi batalas kontraŭ la klopodojn de la Pariza Ŝtato, kiu jam sukcesis malaperigi la regionajn lingvojn. Por norme prononci Esperanton oni devas resti fidela al okcitana parolmaniero, kiun oni pli kaj pli nomas "frank-okcitan". Oni riproĉas nian neobservon pri diferenco inter é, è, ai, o, au, ktp. La modelo estas tiu de Arlet' Ŝabo', matena ĵurnalisto (7h30 - 8h30) ĉe Radio France-Inter. Por ne felietoni mi nenion diras pri la ĉarma akcepto de ge-Dehan, kiuj vere savis nin en tiu babilona stranga stacidomo de Perrache kaj pri la vojaĝo returne al nia marbordo kun k-dinoj Rofo kaj Mathis.

LUPO.

E N P O L L A N D O

Universitata disertacio

F-ino Eleonora Worsztynowicz, studentino pri libroscienco en la Universitato de Poznań, preparas sian licencian disertacion s.t. "Esperantaj bibliotekoj en la mondo". Ŝi volonte ekligos kontaktojn kun bibliotekistoj kaj serĉas informilojn pri Esperantaj bibliotekoj, katalogojn kaj bibliografiojn. Adreso : F-ino Eleonora Worsztynowicz, ul. Poznańska 26 mż 37 PL 63-100 ŚREM, Pollando.

La 1-a Internacia Familia Feriado "Esperanto Hejme"
15-28.08.1982, Międzygórze, Pollando.

De la 15a ĝis la 28a de aŭgusto 1982 en la pitoreska ripozloko Międzygórze en Sudety-montaro okazos la Internacia Familia Feriado "Esperanto Hejme". La feriado antaŭ ĉio estas destinita por esperantistaj familioj/gepatroj kun infanoj, geonkloj kun nevoj, gefratoj, gekuzoj, geedzoj ktp/, lernantoj de mezlernejoj, studentoj, instruistoj. En la programo : konversaciaj kursoj, lingvaj ludoj por junularo (7-16 jaroj), kantezkercado, multaj perpiedaj montaraj ekskursoj, ĝojfajro, lumbildprelegoj, seminario pri familiaj Esperanto-kluboj, ktp. Partoprenkotizo estas 450 guldenoj, 175 usonaj dolaroj, 1000 svedaj kronoj, 410 DM FRG, 95 anglaj pundoj aŭ egalvaloro en alia valuto. Detalaj informoj riceveblaj de : Pola Esperanto-Asocio, P.O.Kesto 16, PL 50-952 WROCLAW 17, Pollando.

La 18a Internacia Esperantista Feriado "La Ora Pola Aŭtuno"
30.08 - 12.09.1982, Międzygórze, Pollando.

De la 30a de aŭgusto ĝis la 12a de septembro 1982 en pitoreska ripozloko Międzygórze en Sudety-montaro okazos la 18a Internacia Esperantista Feriado "La Ora Pola Aŭtuno". En la programo : diversgradaj konversaciaj kursoj, prelegserio pri E-movado, kultura kaj distra programo en Esperanto, montaraj piedekskursoj ktp. Partoprenkotizo estas : 450 guldenoj, 175 usonaj dolaroj, 1000 svedaj kronoj, 410 DM FRG, 95 anglaj pundoj aŭ egalvaloro en alia valuto. Detalaj informoj riceveblaj de : Pola Esperanto-Asocio, P.O. Kesto 16, PL 50-952 WROCLAW 17, Pollando.

*
* *

EN AKVITANIO

En vera eŭforio la partoprenantoj de la Zamenhof-tago en MONTAUBAN (dec.81) ne ekpensis fiksi lokon por la Zamenhof-tago 1982. Kiu grupo sin proponos ĉi-jare ? Skribi al "Laŭte!" !...

Kutime, la akvitanianoj emas renkonti unu la alian ankaŭ en majo. Sed - ĉu influo de la moliga suda vento ? - ankaŭ por tiu renkonto ĉi-jara ili nenion fiksis ! Arbitre ni fiksu rendezuon en VALENCE D'AGEN/GOLFECH la 29an kaj 30an de majo, ĉirkaŭ la budo de nia amikino Ginette. Ĝis!

EN AĜENIO

Ĝenerala jara asembleo de Amika Esperanto-Rondo Aĝenia okazos sabaton 15an de majo, en la stacidomo de LAROQUE TIMBAUT je 14H30. Jara bilanco, renovigo de la responsularo, projektoj por la venonta jaro. Krome, impreso pri la SAT-Amikara kongreso, kiun partoprenis du AERA-anoj.

En Junio, tre verŝajne la 20an, dimanĉe, okazos en AGEN la kongreseto de la franca sekcio de la Internacia Poŝtista E-Asocio. Ĉar hodiaŭ, kiam ni preparas ĉi tiun "Laŭte!", ne eblas esti tute certaj pri la dato, ni konfirmos telefone al la regionaj esperantistoj en junio, por ke ni povu renkonti en Aĝeno niajn gepoŝtistajn amikojn.

Nasrudin eniris frukt-ĝardenon kaj komencis pluki abrikotojn. La ĝardenisto ekvidis lin. La majstro tuj grimpis arbon.

- Kion vi faras ? la ĝardenisto demandis.
- Mi kantas. Mi estas najtingalo.
- Do kantu, najtingalo - mi aŭskultos.

Nasrudin pepis kelkajn malagordajn notojn, tiel malbirdecajn ke la ĝardenisto ridis.

- Tian najtingalon mi neniam aŭdis.
- Do ŝajne vi neniam vojaĝis, la majstro diris. Ĉar tiu estis fremda, ekzotika speco.

komunikis K.Long.

NIA FELIETONO

TRA LA MONDO

per biciklo kaj esperanto

Ĝis NANKIN mi veturas laŭ fervojo paralela al montaro senvegetaĵa kaj senviva. Dekstre vastas JANGZI-valo. La grenrikoltado estas finita kaj jam la kamparanoj komencas irigacii siajn bienojn. Fiŝistoj skrapas la kanalfundojn serĉe al salikokoj kaj angiloj. Pli fore, ili senakvigis laĝeton kaj tiel rikoltas grandan kvanton da svingiĝantaj fiŝoj. Ĉi tie ne estas distro sed vivneceso. Sur monteto oni konstruas vilaĝon kaj ĉio estas transportata dorse aŭ per sio-sio. Tie loĝas la laboristoj de proksima fabriko gardata de soldatoj. Antaŭ ĝia enirejo staras viroj en eluzitaj vestaĉoj, supozeble senlaboruloj petantaj postenon.

Ĉe stacio TAIPING-MEN, en la antaŭurbo de NANKIN, mi forlasas la fervojon. Baldaŭ aperas unu el la pordoj de la urbo, kaj mi eniras tra aŭtenta levoponto ankoraŭ funkcianta. La murego fermas la breĉon de duoncirklo el altaj montetoj ĝiantaj NANKIN urbo preskaŭ nature fortikigita. Pasinte la levoponton, mi vidas kun surprizo kultivatajn kampojn tra kiuj mi veturas duonhore antaŭ ol trafi grandan esplanadon, kie soldatoj futbalas.

Ĉe la konsulejo mi estas afable akceptita de la konsuledzino, kiu bonvene proponas al mi etan manĝon. La konsulo forte malkonsilas, ke mi iru al KANTON tra HUNAN. La regiono estas tre danĝera kaj neniu povos ion por mi. Ion similan oni deklaris al mi en la prefektejo de LIONO, kiam mi petis mian pasporton.

Hankou, la 3an de decembro 1930

Hodiaŭ vespere mi denove devas foriri : mi iros al Hunan, provinco nun fame plej danĝera pro rezistado de iu Maŭ Zedong estranta komunistajn hordojn. Kial mi aliras tien malgraŭ la oficialaj avertoj ? Unue, pro tio ke mian planon mi firme decidis, longe antaŭ mia alveno en Ĉinio. Por trafi Kantonon kaj Hindaĉinion jen estas la vojo geografia plej racia. Poste la esperantistaj kamaradoj donis al mi mapojn pruvantajn, ke ekzistas vojembriojn ĝis Kantono. Laste, okazos al mi nur kio devos okazi. Mia kutimo estas respekti kiun ajn. Tio ĉiam sukcesis por mi ; kaj sperto pruvis, ke veras reciproke.

Aliaj du nepraj kondiĉoj por daŭrigo :

- Mi ne havas sufiĉe daŭmono por retroiri, eĉ al Ŝanhajo per ŝipo.
- Mi volas profiti la belan veteron por iri pli suden al la suno, la varmo, ĉar ekvintras.

En Ĉang-ŝa la 7an de decembro Sinjoro U-I kondukas min al la provinca ĉefgeneralato. Ĉi tiu min akceptas tre afable. Li jam scias pri mia vojaĝo ĝis tie ĉi, inkluzive en Sovetio. Miademande li indikas, ke la vojo al Kantono estas sendanĝera. Nur la lastajn 300 kilometrojn de montara regiono mi devos trairi piede aŭ per ŝipo. Li subskribas ĉiujn miajn paperojn kaj havigas al mi 100 dolarojn.

Denove jen mi survoje. Kvankam estas la 12a de decembro, mi banas min en marĉeto. Kampuloj kaj vojlaboristoj invitas min partopreni ilian simplan manĝon. Ilia honesteco estas ekzempla. Neniam mi konstatos plej etan ŝtelon de iu ajn pakaĵo, kiun devige mi dismontras. La nokto estas iom malvarmeta sed ne frida.

Mia biciklo, tiu eta maŝino, kiu portas tiom da pezo kaj tiel facile traveturas padojn, allogas amasan scivolemon. Kun respekto ili ĝin karesas, palpas, mezuras ĉiudirekte per fingro kaj rigardo. Se mi sonorigas mian avertilon, ĉiuj forkuras.

Ĉi tie, neniuj policistoj. Manĝi estas hazarda entrepreno, ĉar la monon estas tre malsamaj. Distriktoj akceptas nur la nordan monon, aliaj nur la sudan. Por la popolo estas la kupraj sapekoj truitaj kaj ŝnure portataj. Estas la dolaroj de Hongkongo, tiuj de Ŝanhajo, de Kantono, el arĝento kaj biletoj ne uzataj ĉe la etpopolo, sen nombri la vojaĝoĉekojn usonajn aŭ japanajn. Estas vera kapdolorigilo, ĉar la kurzoj senfine varias.

Sabaton la 20an de decembro 1930

Mi estas tre afable akceptita en katolika itala misiejo. Ĝi aspektas malriĉa, la pastroj vivas modeste. La lernejo bone situas, aerumita, prizorgata. La infanoj montras la saman sciavidon kiel en Sovetio kaj Japanio. Sama simpleco ĉe la generalo-guberniestro, 40-jarulo sobre vestita. Lia vizaĝo vidigas simpatian rektanimecon. Tamen la nokton

post mia alveno liaj soldatoj arestis kaj ekzekutis 200-300 personojn suspekto komunista, rakontas mia interpretisto. Noto : Malgraŭ la afable akcepto ĉi ricevita, mi devas konfesi, ke tiuj misiejoj estas ŝtato en la ŝtato. Tamen mi aldonas, ke ilia instru- kaj kultur-laboro estas nenuebla kaj ili estas tre ŝatataj de la popolamasoj. "Ni, misiistoj, venis pro alvokiteco, ne pro persona profitemo".

Hieraŭ estis tre varme : 25 gradoj C. Sed hodiaŭ blovas norda ventego kaj la temperaturo malaltiĝis ĝis 10 gradoj. De Ĉang-ŝa al Kantono mi vidis neniun izolitan farmobienon, sed nur vilaĝojn kiel en Sovetio. Ĉi tie estas eĉ urbetoj plejofte ĉirkaŭitaj de dikaj kaj altaj muregoj kun levoponto.

En Kantono mi eniras la 24an de decembro post trairo de florumita antaŭurbo kaj vicoj da domoj kun ĉiu sia ĝardeneto antaŭ la pordo. Momente Kantono estas nur grandega vilaĝo, aŭ pli ĝuste kuniĝo da vilaĝoj. Neniu tramo, nur aŭtobusoj. Tute novaj kaj rektliniaj arterioj atestas, ke la urbo estas en plena modernigo.

La konsulo en Kantono akceptas min kun mieno distanca kaj suspekta. Mia vestaro nocas al la franca prestiĝo. Krome, franco trairinta sen damaĝo danĝerajn komunista regionojn, kaj plie akompanata de du ĉinoj, estas vere inda je suspekto. Kiam mi diras mian intencon iri al Hindaĉinio terveture, li krias pri frenezaĵo. Ĉi-foje la entrepreno ja estas vere hazarda. La limo inter Ĉinio kaj Tonkino konsistas el preskaŭ netransireblaj montoj trarabataj de dizertintoj. Pli sekure estos enŝipiĝi.

Hodiaŭ, dimanĉon la 8an de februaro 1931, la vetero estas malvarma ; tial mi preferas iri promeni en la centron. Mi konstatas urboplanisman deziron laŭ modernaj normoj : longaj kaj larĝaj avenuoj arboborderitaj. La metodo estas inversa al la soveta. Unue oni konstruas la straton kun trotuaroj, glata pavimo kaj tramreloj. Por suprenigi la materialon la manlaborularo estas ĉefe virina. Malgraŭ la granda lerteco de tiuj virinoj estas multe da akcidentoj kaj miascie ne ekzistas sociasekuro. Fine mi trafas la eŭropan "koncesion". Ĉi tie ne estas stratoj. Ĉiuj vilaoj, palacoj, estas konstruitaj ĉirkaŭ grandega parko kun sportejoj. Fosaĵoj kaj pikdratoj disigas tiujn du mondojn.

(daŭrigota)

Alfa-Beta.

Por la infanoj :

L A N U B E T O kaj L A F A N T O M O

Iun tagon, dum li superflugis regionon, kie svarmas malnovaj kasteloj kun pintaj turoj, la Nubeto ekvidis en la foro makulon same blankan kiel li. Li alproksimiĝis, kredante, ke temas pri samspeca nubo kaj tiel li povis pli nete vidi.

Dum li malsuprenflugis, li ekkonsciis, ke tiu aĵo havas okulojn, buŝon kaj ian nigran voston kun bulo ĉe la ekstremaĵo. Tio ne estis nubo, sed kio do ?

- Nu, diru. Al kio ci similas ? li demandis ĝin.
- Ĉu ci ne konas min ? Ĉu do mi ne timigas cin ? Sed kiu do ci estas, kaj de kie venas ci, ne timanta fantomon ? Ja la unuan fojon okazas al mi, ke oni ne fuĝas for de mi, ĉar kutime, krom kun miaj similuloj, estas malmultaj personoj, kun kiuj mi povas babili. Mi tamen ŝatas ĉiujn, kaj ja ŝatus de tempo al tempo havi kunparolanton, sed vane ; tuj kiam mi al iuj proksimiĝas, ili timas, fuĝas kaj plu forkuras. Afabla ci aspektas, ĉu ci deziras, ke ni estu amikoj ? Tiel mi ne plu estos sola.
- Mi bonvolas, ĉar ja ankaŭ mi ne havas multajn amikojn. Tuj kiam mi alproksimiĝas, la homoj eniras hejmen kaj sin kaŝas, kaj mi estas tre sola. Tamen mi ŝatus partopreni la ludojn de la infanetoj, ronddanci aŭ salti kun ili. Ili estas impetaj, vivplenaj ; sed vane.
- Ci ja vidas, por mi estas same ; endas diri, ke mi tiom bruas per mia ĉenaro kaj mia obtuza voĉo...
- Malfruiĝas, mia panjo maltrankviliĝas, mi foriru, sed mi promesas tre baldaŭ veni cin viziti.

La Nubeto jam forflugis kaj, rerigardante, li vidis sian novan amikon, la fantomon, kiu mane adiaŭas lin.

J.P.Hennebois.